IPR
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO


Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 37 - trimonata
07/3

Redakta komitato:
Jozefo Németh (red.)
Luiza Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Jozefo Baksa
Augusto Casquero
Aida Cizikaite
Renato Corsetti
Nina Daniljuk
Koffi Gbeglo
Tieko Isikawa
Marija Jerkovic
Zsofia Korody
Katalin Kovats
Marcel Leereveld
Genovaite Liepinia
Hokan Lundberg
Eduardo Navas
Tiina Oittinen
Radojica Petrovic
Sonja Petrovic
Mihai Trifoi
Blazio Wacha
Wu Guojiang





ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Renato CORSETTI: *La motivaro de la projekto Lingvolanĉilo* 4
Esperanto en la Universitato de Stokholmo (Kompilis: Radojica PETROVIĆ) 9
WU Guojiang: *Altlerneja E-agado en Liaoning-provinco de Ĉinio* 10
Marcel LEEREVELD: Pri la vicordo de gramatikaj temoj 14
El la landoj kaj sekcioj [AU, AT, BR, BG, BI, CN, FI, DE, HU, HR, SV, TG, UA] .. 18
Pri edukado, instruado kaj ILEI dum UK (Jozefo BAKSA) 27
La Tago de la Lernejo – 7 aŭgusto (Mihai TRIFOI) 28
Pinĉilumado kaj paroligaj lecionoj kun www.edukado.net (Katalin KOVÁTS) 29
Resume pri la 40-a ILEI-konferenco (Aida ČIŽIKAITĖ, Tieko ISIKAWA) 32
La 41-a Konferenco de ILEI en Benino 2008 (alvoko, informoj, prezoj) 36
La 42-a Konferenco de ILEI en Slovenio 2009 (alvoko, informoj) 38
ILEI-Konferenco en via lando en 2010 (alvoko) 38

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica Petrović, *Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053. Fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Vicprezidanto: Zsófia Kóródy, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983. <zsofia.korody@esperanto.de>* Instrukapabligado kaj edukaj centroj.

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <atilioorellanarojas@gmail.com>*

Estrarano pri financoj: Sjoerd Bosga, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.* Administra sistemo.

Vicsekretario: Mihai Trifoi, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio (+40) 267-365319, <trifoi@honoris.ro>.* Lerneja agado.

Estrarano: Aida Čižikaitė, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>.* Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Yas Kawamura, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio, <esperanto@d0y0b.com>.* Azia agado.

La nunan numeron ni sendis al la presejo 4 septembro 2007, redaktofino por la sekva numero 31 oktobro 2007.

Sur la titolpaĝo malsupre: Renkontiĝo de kulturoj dum paroliga kurso de edukado.net (p.29-31.), supre: AKEL-2 renkontiĝo en Bulgario (p.20).

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko

***Membroj*:**

Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn, AIS[2] San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, University of Hyderabad; AdE[1]

Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono, AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]

Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre

Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, Magyar Tudományos Akadémia, Nyelvtudományi Intézet

***Sekretario:* Aida Čižikaitė**, Litovio, estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto

[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

Karaj Legantoj!

La Prezidanto de ILEI jam ekde 1-2 jaroj delikate instigas min por verki la enkondukajn vortojn, sed ĝis nun mi ĉiam trovis volontulojn por tiu tasko. Ĝis nun… ☺

Se mi jam ricevis la vorton, unue permesu, ke mi publike gratulu Probal DASGUPTA, membron de SK, pro lia nova ofico ĉe UEA. Ankaŭ la ĝisnuna prezidanto, Renato CORSETTI, estas membro de nia SK, kiu nun certe trovos eĉ pli da tempo por IPR. La unua pruvo de tio estas lia ĉefartikolo verkita originale por la angla 'Lingvolanĉilo'.

Pluraj membroj de niaj SK kaj redakcio aktivis ankaŭ en Japanio, vd. la kongresajn kaj konferencajn raportojn, kiuj regas la nunan numeron. Ĉi-foje do kulpas ne (nur) mi, ke la proporcio de sciencaĵoj estas malpli granda. Tiuj aktualaĵoj bedaŭrinde ŝovis plu al la sekvaj numeroj bonajn artikolojn de Géza KURUCZ, Geraldo MATTOS, Georges-Henri CLOPEAU, Betty CHATTERJEE, Anna kaj Mati PENTUS k.a. (La pli grandaj prelegoj de la lastatempaj simpozioj – esperebleaperos en speciala numero.)

Mi tre dankas al Rob MOERBEEK, kiu sola provlegis la nunan numeron (samtempe mi petas la sinanoncon de pliaj volontulaj provlegantoj).

Jozefo Németh
redaktoro

La motivaro de la projekto *Lingvolanĉilo*[1]

Renato CORSETTI (*Universitato de Romo* La Sapienza)



La propedeŭtika efiko

Multaj studoj ekde la 1920-aj jaroj senvarie konfirmas, ke lerni E-on plibonigas la sininstigon de la lernanto pro sento de frua atingo, rezultigante postan pliboniĝon dum la lernado de aldonaj lingvoj. Tian *propedeŭtikan efikon* (kia faciligas pluan studadon) oni bone konas en eduka psikologio kaj regule utiligas tra gamo da fakoj, de muziko ĝis matematiko.

La kutima eksperimenta modelo koncernas du paralelajn, konformigitajn grupojn da infanoj, kiuj studas tipe dum du aŭ tri jaroj. Unu grupo lernas fremdan lingvon – ekzemple la francan aŭ la germanan – dum la tuta periodo; la alia studas E-on dum unu jaro (aŭ kelkfoje pli longe), kaj poste la fremdan lingvon dum la cetera tempo. Fine de la eksperimenta periodo, ambaŭ grupoj faras normigitan teston pri la fremda lingvo. Senvarie, la grupo studinta E-on antaŭ ol la fremdan lingvon rimarkinde pli sukcesas ol la kontrolgrupo.

Ekzemple, studo en Germanio en la 1970-aj jaroj koncentriĝis pri la propedeŭtika efiko de E-o sur germanaj infanoj lernantaj la anglan kaj trovis gajnon de 30% en normigitaj testoj kompare al la progreso de infanoj kiuj antaŭe ne studis E-on; en kvinjara kurso, tio reprezentas gajnon de jaro kaj duono. Simila eksperimento en Italio en Romo en la lernojaro 1998-1999 mezuris la evoluon de la prilingva konscio en la propra lingvo de infanoj lernintaj E-on dum unu jaro kompare kun infanoj ne lernintaj ĝin. La infanoj estis ĉirkaŭ 12-jaraj komence de la lernojaro. La mezurado estis farita per testo normigita por mezuri la prilingvan konscion en la itala, TAM2[2]. La rezulto montris tre rimarkindan kreskon de la prilingva kapablo en la infanoj lernintaj E-on.

[1] Ĉi tiu artikolo estis originale verkita pete de (kaj por) *Springboard to Languages* (la brita 'lingvolanĉilo').

[2] TMK2 – 'Testo pri metalingva kapablo'

Lingvo-konscio

Dulingvaj infanoj estas *pli komprene fleksiĝemaj* ol iliaj unulingvaj samaĝuloj. Tiun ideon unuafoje proponis PEAL & LAMBERT (1962), kaj la literaturo de la lastaj jaroj ĉiam pli konfirmis ĝin. Komprena fleksiĝemo vidiĝas en diversaj formoj de pensado, de spaco-perceptado tra logika-matematika rezonado ĝis diversaj aspektoj de lingva procezado, precipe tiuj kun metalingva agado. Por resumo de la literaturo vidu REYNOLDS 1991. (Vidu ankaŭ BAKER & PRYS-JONES 1998, kaj Pinto 2002.)

Unulingvaj kaj dulingvaj infanoj tial diferencas laŭ sia *lingvo-konscio*: sia konscio pri certaj konceptoj – vortklasoj, vortordo, finaĵoj, fleksioj, akordo kaj nombro – kaj pri tio, kiel tiuj varias inter la gepatra lingvo kaj aliaj lingvoj. Bona lingvo-konscio konsiderinde faciligas lingvolernadon. Ĝuste pro tio, unulingvaj britaj infanoj tiom gajnas, lernante duan lingvon. La pli fortan lingvo-konscion ligitan kun dulingveco oni povas utiligi por plikompetentigi pri la angla mem, kaj pri iu ajn alia lingvo poste lernota. Kiel notis BYALISTOK (1988), gravaj sekvoj de tiu metalingva konscio estas, ke ĝi povas helpi al pli frua eklerno legi, kaj ke ĝi eble rilatas al pli sukcesa lernado en la cetera lernprogramo. Pluraj studoj montras ĝuste tian efikon sur la gepatralingva kompetento de infanoj, kiuj lernas E-on, eĉ se nur unu horon semajne dum unujara periodo (PINTO/CORSETTI 2001).

Lingvo-konscio estas grava indiko pri (posta) akiro de tria lingvo (JESSNER 1999), en kiu okazo la rilatoj inter du lingvoj jam sciataj servas kiel ponto al la tria. Jen rekta citaĵo el Safant JORDÀ (2005): 'Konsiderante lastatempajn esplorojn, ni povas supozi, ke dulingvaj lernantoj akiros kroman lingvon pli rapide kaj pli efike.' Studoj pri la akiro de tria lingvo nun pliiĝas, ĉefe en Eŭropo, kie al la regiona lingvo de la lernanto oni ofte aldonas la nacian lingvon, kaj poste lingvon por pli vasta komunikado, kiel la angla (BROEDER/EXTRA 1999). Sed oni trovas trilingvajn situaciojn ankaŭ en aliaj kontinentoj (RUBAGUMYA 1994, TICKOO 1996, DUTCHER 1998). Tiuj studoj montras, ke scii duan lingvon ĉiam helpas lerni trian.

La naturo de Esperanto

E-o estas, relative, tre facila lingvo. Ĝia leksiko estas pruntita el naciaj lingvoj, sed ĝia aparta karaktero gramatika lokas ĝin centre inter fleksiaj, aglutinaj, kaj izolantaj lingvoj. Fakte en Esperanto enestas elementoj el ĉiuj tiuj lingvospecoj (GLEDHILL 1998):

- La leksiko deriviĝas ĉefe el lingvoj de la grupoj latinida kaj ĝermanida, sed atentinda estas ankaŭ la kontribuo el aliaj grupoj.
- La gramatiko de la lingvo estas tamen unika. Krom la leksikaj morfemoj ekzistas aro da gramatikaj morfemoj, kiuj specifas la rolon de ĉiu vorto en frazo. WELLS (1989) resumis la karakteron de E-o kiel a) ekstreme aglutinan, b) milde sintezan, c) havantan senŝanĝajn morfemojn, kaj c) havantan nur unu deklinacian paradigmon, kaj nur unu konjugacian.

Multaj eksperimentoj efektiviĝis por mezuri, kiel facile eblas lerni E-on, ekde la pionira laboro de THORNDIKE (1933). Senescepte, la konkludoj estis pozitivaj. La sola demando hodiaŭ esplorenda temas pri la lernfacileco de E-o rilate al la diversaj denaskaj lingvoj de individuaj studentoj (NAGATA/ CORSETTI 2005).

La regula strukturo kaj gramatika travidebleco de E-o kaŭzas, ke la lernanto konsideras, kiel lingvoj funkcias. Kontraste, la ĝenerala foresto de rolmontriloj ĉe la vortoj de anglalingva frazo – manko, kiun la angla kompensas per fiksa vortordo – estigas, ke unulingva parolanto de la angla ne povas imagi, kiel funkcias aliaj lingvoj, kun pli riĉaj morfologiaj sistemoj. Ke lerni E-on estas facile, ebligas, ke infanoj vere *ekuzas* ĝin pli frue; tio donas al ili senton de sukceso, kiu siavice instigas ilin al plua lingvolernado. Tiaj observoj de la propedeŭtika efiko troviĝas tra la tuta literaturo pri la instruado de E-o.

Lingva distanco

Alia grava faktoro de la akiro de tria lingvo estas 'lingva distanco'. Probablas, ke lernanto pli facile mastros trian lingvon, se ĝi estas tipologie proksima al la dua. Oni povas difini lingvan distancon nur relative: kelkaj lingvoparoj estas reciproke pli aŭ malpli proksimaj ol aliaj. Oni devas analizi ĝin ankaŭ sur diversaj lingvistikaj niveloj: fonologia, leksika, sintaksa kaj pragmata. Ekzemple, la angla estas tipologie ĝermanida lingvo, sed historiaj eventoj rezultigis grandan nombron da pruntovortoj el latino kaj la latinidaj lingvoj. Simile, E-o havas lingvan strukturon, kiu enhavas elementojn el ĉiuj lingvogrupoj (WELLS 1989) kaj leksikon prenitan plejparte el la latinida kaj ĝermanida grupoj.

Por anglalingva infano do, la propedeŭtika efiko derivita el E-o validas (almenaŭ je la morfologia nivelo) por ĉiuj hindeŭropaj lingvoj pli konser-

vativaj ol la angla – t.e. por ĉiuj tiaj lingvoj escepte eble de la persa. Ĝi povas helpi eĉ la lernadon de lingvoj tiel malproksimaj kiel la slavaj lingvoj, aŭ la urdua aŭ la hindia. Aliflanke, je la leksika nivelo, pli evidentas helpo pri la lernado de lingvoj latinidaj aŭ ĝermanidaj. Por studoj pri la propedeŭtika efiko de E-o sur la lernado de postaj lingvoj fare de anglalingvaj infanoj, vidu ekzemple HALLORAN (1959).

Praktikaj studoj

La unua dokumentita praktika studo okazis en Girls' County School, Bishop Auckland, Britio, en 1918-21, voktate de la oficialaj lernejaj revizoroj. Post tio la ĉefaj studoj inkluzivis:

- 1920 Green Lane School, Eccles, Britio
- 1922 Oficiala Enketo de la Ligo de Nacioj, Ĝenevo, Svislando
- 1922–24 Bishop's Elementary School, Auklando, Nov-Zelando
- 1924 Wellesley College, Ohio, Usono
- 1925–31 Columbia University, Nov-Jorko, Usono (prof. E. Thorndike)
- 1934–35 Public High School, Nov-Jorko, Usono
- 1947–51 County Grammar School, Sheffield, Britio (University of Sheffield)
- 1948–61 Egerton Park School, Manĉestro, Britio
- 1950–63 Somero, Finnlando (Ministerio pri Edukado)
- 1962–63 Universitato L. Eötvös, Budapeŝto, Hungario (prof. I. Szerdahelyi)
- 1971–74 22 klasoj el Italio, Jugoslavio, Hungario, Bulgario
- 1972–73 Scuola Elementare Dante, Forlì, Italio (Ministerio pri Edukado)
- 1975–77 300 lernantoj el Belgio, Francio, Germanio, Grekio, Nederlando
- 1977–83 Universität Paderborn, Germanio (prof. H. Frank)
- 1983–88 Scuola Media, San Salvatore di Cogorno, Italio
- 1993 Oficiala Raporto: Ministerio pri Edukado, Italio
- 1994–97 Monash University, Victoria, Aŭstralio (prof. A. Bishop)
- 1998-99 Scuola media Aristide Leonori kaj aliaj, Roma, Italio

El ĉiuj tiuj studoj, eble la plej ĝisfundaj estis tiuj de profesoro Helmar FRANK de Universität Paderborn, Germanio, en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj. Tiuj ampleksaj studoj naskis la koncepton de lingvo-konscio. Oni observis, ke lingvo-konscio plej facile evoluas pere de lingvo relative simpla, regula, fonetika kaj rekonebla, kiel E-o. Profesoro Alan BISHOP de la Fakultato pri Edukado, Universitato Monash, Aŭstralio, resumis la esplortrovaĵojn en la fina raporto de sia praktika studo (2000): 'Klare estis el

eksperimentoj … ke E-o helpis al lernantoj bone kaj rapide eklerni sian duan … lingvon.'

Referencoj / Bibliografio

Baker, C./Prys Jones, S., 1998: *Encyclopaedia of Bilingualism and Bilingual Education*. Clevedon: Multilingual Matters.

Broeder, P./Extra, G., 1999: *Language, Ethnicity and Education*. Clevedon: Multilingual Matters.

Byalistok, E., 1988: '*Levels of Bilingualism and Levels of Linguistic Awareness'*, en Developmental Psychology, 34(4), 560-567.

Dutcher, N., 1998: '*Eritrea: Developing a programme of multilingual education',* en J. Cenoz/F. Genesee (red.), Beyond Bilingualism: Multilingualism and Multilingual Education. Clevedon: Multilingual Matters, 259-265.

Gledhill, C., 1998: *The Grammar of Esperanto*. München: Limcom Europa.

Halloran, J.H., 1952: '*A Four-Year Experiment in Esperanto as an Introduction to French'*, en British Journal of Educational Psychology, 22 (3), 200-204.

Jessner, U., 1999: '*Multilinguistic Awareness en Multilinguals: Cognitive Aspects of Third Language Learning'*, en Language Awareness, 8, 201–209.

Nagata, H./Corsetti, R., 2005: '*Influoj de gepatra lingvo sur la lernado de Esperanto: psikolingvistika esploro*', en Esperantologio/Esperanto Studies, 3, 5-39.

Peal, E./Lambert, W., 1962: '*The relationship of bilingualism to intelligence'*, en Psychological Monographs, 76/27, 1-23.

Pinto, M.A./Corsetti, R., 2001: '*Ricadute metalinguistiche dell'insegnamento dell' esperanto sulla lingua materna dell'alunno: Un'esperienza nella scuola media italiana*', en Language Problems & Language Planning, 25/1, 73-90.

Pinto, M. A., 2002: '*Bilinguismo e sviluppo metalinguistico'*, en G. Di Stefano, R. Vianello (a cura di), Psicologia dello sviluppo e problemi educativi: Studi in onore di Guido Petter. Firenze: Giunti, 280-295.

Reynolds, A.G., 1991: '*The cognitive consequences of bilingualism'*, en A.G. Reynolds (red.), Bilingualism, Multiculturalism and Second Language Learning. Hillsdale, NJ: Erlbaum, 145-182.

Rubagumya, C.M., 1994: *Language in Education in Africa*. Clevedon: Multilingual Matters.

Safont Jordà, M.P., 2005: *Third Language Learners – Pragmatic Production and Awareness*. Clevedon: Multilingual Matters.

Thorndike, E.L., 1933: *Language Learning*. New York: Division of Psychology, Teachers' College, Columbia University.

Tickoo, M.L., 1996: '*English in Asian bilingual education: From hatred to harmony*', en Journal of Multilingual and Multicultural Development, 17, 225-240.

Wells, J., 1989: *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: UEA.

Esperanto en la Universitato de Stokholmo

Gramatikkontrolilo por Esperanto

La 28-an de aŭgusto 2007 komenciĝis E-kurso en la Universitato de Stokholmo kun ĉ. 30 aliĝintoj. La kursanaro estas interesa mikso de junuloj kaj maljunuloj (unu estas 78-jarulo, alia 77, sed la plejmulto aĝas ĉ. 25 jarojn), lingvemuloj kaj nelingvemuloj, kaj eĉ svedoj kaj nesvedoj. Plej multaj el ili deklaris, ke ili aliĝis por ekscii iom pri E-o (interesiĝas pri lingvoj ĝenerale) aŭ por lerni paroli E-on (delonge volis fari tion, aŭ simple pro scivolo, aŭ ĉar iu amiko faris tion). Kelkaj jam parolas la lingvon kaj deziras plibonigi siajn jamajn sciojn. La kurso okazos dum 2 semestroj kiel vespera kurso. Instruos Hartmut TRAUNMÜLLER, Sonja PETROVIĆ-LUNDBERG kaj Håkan LUNDBERG. Entute estos kvar subkursoj (kelkaj aliĝintoj partoprenos nur la unuan): 1) Enkonduko al Esperanto; 2) Interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj; 3) Profundiĝo en E-on; 4) Pri la kulturo kaj movado de E-o.
Dum la enkonduka subkurso estos multe uzata *lernu.net* kaj retbazita eduksistemo de la universitato kiu nomiĝas *Mondo*. Ĝi estas iom modifita versio de http://sakaiproject.org/ kaj estas amuze, ke la universitato elektis nomon en E-o por sia retbazita eduksistemo. Meze de oktobro estos konataj la unuaj rezultoj de la unua kurso.

***

Fine de la sama semajno okazis, same en la Stokholma Universitato, plankunsido de projekto kiu celas krei gramatikkontrolilon por E-o. En agrabla etoso la projektestro Eckhard BICK, lingvisto kaj e-isto el Danio/Germanio, profesie instruis pri *Constraint Grammar*[3] kaj rilataj aferoj. Tagordo kaj listo de partoprenintoj videblas ĉe http://vikio.ikso.net/Projektoj/Gramatik Kontrolilo/Kunsido1. Laŭplane la projekto komenciĝos en novembro kun subteno de ESF (*Esperantic Studies Foundation, http://www.esperantic .org/*). La unuaj testeblaj rezultoj estos espereble pretaj junie 2008. Du el la partoprenantoj de la projekto Sonja PETROVIĆ-LUNDBERG kaj Marek BLAHUŠ, studentoj de komputila lingvistiko, planas utiligi certajn temojn el la projekto por studentaj laboraĵoj kadre de siaj studoj.

Kompilis Radojica PETROVIĆ laŭ informoj de Hokan kaj Sonja LUNDBERG

[3] Constraint Grammar: Metodologia aliro kaj ilo de aŭtomata prilaboro de naturaj lingvoj (Natural Language Processing – interdisciplina subkampo de artefarita intelekto kaj lingvistiko)

Wu Guojiang

Altlerneja E-agado en Liaoning-provinco de Ĉinio[4]



E-o eniris en la provincon Liaoning, Ĉinio, en la komenco de la 20-a jarcento. En 1911 oni starigis E-lernejon en Shenyang (siatempe ĝi nomiĝis Fengtian), la nuna ĉefurbo de la provinco. Dalian Kolegio de Fremdlandaj Lingvoj unue funkciigis E-kurson en oktobro 1957. Tamen grandskala E-movado komenciĝis nur en la komenco de la 80-aj jaroj de la 20-a jarcento. La varma tajdo de E-o en la provinco vekis atenton i.a. de s-ro *Lawrence WALKER*, ekonomia konsulo ĉe la Konsulejo de Usono en Shenyang. Vizitis Liaoning-provincan E-Asocion (mallonge LEA) la raportisto *Adi IGNATIUS* de la usona ĵurnalo The Wall Street Journal speciale veninte de Pekino por intervjui nin. Tiam ankaŭ diversaj E-kursoj estis funkciigitaj en la nemalmultaj altlernejoj de la provinco. Inter ili Dalian-Universitato unue enkondukis E-on kiel nedevigan studobjekton en 1983. Tamen enire de la 90-aj jaroj granda ŝanĝo okazis en Ĉinio kaj ekfunkciis la sistemo de la socialisma merkata ekonomio. Tio ege atakis la Ĉinan E-movadon. Ankaŭ la Liaoning-a E-movado (malongige LEM) drastе falis. Tre malmultaj personoj plu vizitis la kursojn organizitajn de LEA kaj ĝiaj urbaj filioj, kompare kun kursoj de la angla, franca, japana, germana ktp. LEA kaj LEM komencis alfronti novan ekzamenon kaj defion.

1. Penado kaj esplorado

En la 90-aj jaroj la influo de la ekonomie fortaj lingvoj al disvastigo de E-o estis granda kaj profunda sub la sistemo de la socialisma merkata ekonomio. Multaj personoj havis la komunan opinion, ke E-o tre malfacile kondukis ilin al akiro de praktika efiko pro sia limiĝo de apliko kaj manko de uzmedio, ekz. en Ĉinio E-o nemulte estis uzata en ekzamenoj de fremdaj

[4] La prelego estis aŭskultebla dum la Tago de La Lernejo de UK 2007. La aŭtoro naskiĝis en 1965 kaj li estas altranga inĝeniero pri petrolkemio. Esperantistiĝis en 1984 kaj estas la vic-prezidanto de Liaoning-provinca E-Asocio.

lingvoj por promociiĝo de posteno. Kaj tiu influo daŭras ĝis hodiaŭ. Kvankam LEA provis diversajn metodojn kaj klopodadon por plibonigi kaj antaŭenirigi la movadon en la provinco, la efiko ne estas sufiĉa. Ekz. ni sukcese ĉesigis la decidon de la ŝtataj departementoj pri nuligo de ekzamena objekto en Liaoning (kiel prova unuo), sed aliĝintoj al tiu ekzameno malmultiĝis. Plue en 2002 s-ro *Liu Zhengkun*, prezidanto de LEA, prenis kaj kolektis kelkajn dekmilojn da juanoj reklami E-kursojn en ĵurnaloj je provinca nivelo, sed anoncis sin por la kurso malpli ol kvardek personoj. Alfronte tian situacion la laboroj de LEA renkontis senprecedencajn malfacilaĵojn, sed LEA ne retiriĝis kaj aktive komencis novan esploron.

2. Strategia ŝanĝo

Kiel ŝanĝi tiun ĉi situacion? La estraro de LEA plurfoje kunvenis kaj diskutis pri tio. Ĉiu sentis kaj opiniis, ke disvastigi kaj instrui E-on en altlernejoj estas bona eblo por progresigi la movadon en la provinco, ĉar poste la studentoj pli kapablas alpreni kaj kompreni ajnan novan lingvon. El sciemo kaj intereso multaj studentoj deziras lerni kaj posedi novan scion, E-o ja estas nova scio al tiuj studentoj kiuj neniam aŭdis aŭ kontaktis ĝin. El profito elekti E-on signifis akiri pli multajn studpoentojn. Alie, la scienca strukturo de E-o mem faciligis al la studentoj lerni E-on, almenaŭ ili ne necese prenas tiom da tempo fari tion. La praktikado preni E-on kiel nedevigan studobjekton en Liaodong-Instituto (la antaŭa Liaoning-Financa Kolegio) kaj Liaoning-Universitato, sidejo de LEA, pruvis ke nia strategio estas prava. Pli ol 170 studentoj en la instituto anoncis sin por la kurso, pli ol 120 studentoj en la universitato por la kurso.

3. Kiel solvi novan problemon?

Kun la evoluo de E-instruado en altlernejoj nova problemo reaperas antaŭ ni. Tio estas: tre mankas E-instruistoj! Ni klare konscias ankaŭ, ke tio estas urĝa tasko kiu estas plenumenda kiel eble plej rapide, t.e. problemo tuj solvenda. Estas kelkaj kialoj: unue kiam E-instruistoj emeritiĝas, tiuj altlernejoj, kie ili laboras, perdas la eblon daŭre funkciigi E-kurson; due kiam kelkaj lernejoj samtempe bezonas E-instruistojn, ni ne povas sendi tiom da instruistoj; trie, ankaŭ la plej grava, pli multajn instruistojn bezonas la celo grandskale antaŭenpuŝi E-instruadon en altlernejoj de la tuta provinco. Do celante tion aktive liginte Liaoning-provincan Instruan Instituton de Fremdlandaj Lingvoj por Altlernejoj kaj sufiĉe utiliginte ĝiajn influon kaj superecon ne-anstataŭigeblajn en la socio ni vizitis pli ol 20 altlernejojn kaj

invitis ilin elekti kaj sendi elstarajn junajn instruistojn el la fremdlandaj lingvaj institutoj (aŭ fakultatoj) al kurso baki E-instruistojn. Rezulte 58 instruistoj diplomiĝis kaj jam laboras, ekz. du el ili sukcese instruis E-on al 600 studentoj en Shenyang-Universitato.

4. Kelkaj spertoj

4.1 La laboro nepre devas esti planata

Ajna laboro de E-o devas esti zorge planata. El diversaj kanaloj multaj personoj informiĝis, ke ĉi tiu jaro estas la E-instrua jaro de LEA. Por efike realigi la celitan planon frue en 2006 ni faris necesajn laborojn, ekz. prelego pri E-instruado en la labora konferenco pri la provinca instruado de fremdaj lingvoj, la unua E-seminario de altlernejoj en la provinco, kiun ĉeestis estroj el la fremdlingvaj institutoj (fakultatoj) de 11 universitatoj. Ĉi-jare ni intence aperigis artikolojn pri E-o en diversaj famaj gazetoj ne-esperantaj kiujn oni tre ŝatas legi kaj aĉeti, ekz. „Famuloj", „Teoria Horizonto", „Artopioniro" ktp. En majo projekto nomita „Altigo de Kultura Kvalito" estis funkciigita en Liaoning-Universitato, 17 profesoroj estis elektitaj inter cento da aliĝintoj kaj invititaj fari prelegojn koncerne tiun temon. Profesoro *Liu Zhengkun* kaptis kaj gajnis tiun ĉi ŝancon per temo „Idealo kaj kultura valoro de E-o", pli ol 350 studentoj kun intereso aŭskultis lian prelegon. La priaj afiŝoj siatempe estis ĉie videblaj en la tuta universitato. Ĉio ĉi kreas utilajn kondiĉojn por la instrua jaro. Nun ĉirkaŭ 1000 studentoj estas lernantaj nian lingvon en kelkaj altlernejoj.

4.2. La laboro devas esti iniciatema

E-instruado estas sistema laboro. En ĝi iniciatemo estas nepra. Por allogi kaj interesi studentojn ni starigis la unuan Klerigan Bazon de E-o por Altlernejoj en Shenyang-a Muzika Universitato, samtempe por diferencaj karakterizoj de altlernejoj ni prenis malsamajn instruajn metodojn, ekz. ni enkondukis metodon nomatan reciproka movado en Shenyang-a Muzika Universitato kaj atingis kontentigan efikon. La reciproka movado estas, ke ni aranĝis parton de la lecionoj ekster la klasĉambro, la studentoj unue faris demandojn al la publiko, poste la instruistino instruis ilin kiel esprimi la demandojn kaj respondojn en E-o. Plue en la supremenciita kurso de E-instruistoj ni ŝanĝis la tradicion: nur instrui lingvon, sed instrui kaj E-on kaj ĝian historion. Tiel la kursanoj povas havi sisteman scion pri E-o, se ne la simplan.

4.3 La estraro de la loka E-organizaĵo estu unueca kaj diligenta
Estraro de loka E-organizaĵo estas baza kaj grava kolektivo por gvidi la lokan movadon. La movado ne marŝus se tiu ĉi grupo estus malunueca. La laboro ne progresus se tiu ĉi grupo estus tre inerta. Ni, Liaoning-provinca E-Asocio, klare konscias tion, profesoro *Liu Zhengkun* ofte diras al la estraranoj: „entreprenu E-on kiel grandan aferon". Ĝuste pro tiu ĉi klara koncepto multaj laboroj povis esti sukcese plenumitaj en la kurta tempo, ekz. la libro „Vivo de Zamenhof" por la Pekina UK en 2004, la libro „Evolua Historio de E-o" por la celita kurso en Liaoning-Universitato, preparo por la unua E-Seminario de Altlernejoj en la provinco, kaj tiel plu.

Indas mencii, ke sub la penado de profesoro *Wang Tailin*, vic-prezidanto de LEA, E-o estis instruata kiel nedeviga studobjekto en Dalian Universitato ekde la jaro 1983 kaj entute pli ol 2000 studentoj lernis ĝin. Tio ankaŭ estas aktuala priskribo pri tiu ĉi flanko.

Karaj kongresanoj, de la supra prezentado ni nemalfacile konkludas, ke la E-instruado en altlernejoj estas efika vojo por disvastigi kaj popularigi E-on en Ĉinio, precipe en la provinco Liaoning. Tamen ni scias, ke tio ne estas la unika metodo progresigi la movadon, ni aktive esploros novajn metodojn utilajn por la evoluo de E-o en la nuna Ĉinio.

Nun ni plezure informas vin ĉiun pri tio, ke en la venonta semestro kelkaj universitatoj en la provinco enkondukos E-on, ekz. Bohai Universitato, Liaoning-Petrolkemia Universitato, Shenyang-Medikamenta Universitato, Shenyang-Agrikultura Universitato ktp. Ni komencas preparajn laborojn por enkonduki E-on kiel devigan studobjekton en iu Universtiato, unu fruktdona laboro estas, ke profesoro *Feng Yuzhong*, la ĉina fama ekonomiisto kaj eksa estro de Liaoning-Universitato plezure akceptis nian inviton esti honora prezidanto de LEA.

Kun la subteno de diversaj organizaĵoj kaj esperantistoj ni kredas, ke la altlerneja E-agado atingos grandan sukceson, kaj nova situacio pliĝojiga aperos en la provinco Liaoning!
Koran dankon pro via aŭskulto!

Wu Guojiang, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fushun Liaoning. Rete: ghemelurboj@yahoo.com.cn; amikeco999@21cn.com

Marcel LEEREVELD (Aŭstralio)

Pri la vicordo de gramatikaj temoj[5]

kelkaj konsiloj por kursgvidantoj kaj lernolibro-verkistoj

Kiam oni konstruas domon, la arĥitekto kaj la konstruisto jam antaŭe elverkis[6] la desegnon. Ilia desegno dependas de la interrilatoj eblaj inter la multaj diversaj partoj de la konstruotaĵo, kaj tiuj rilatoj do diktas la konsiston de la partoj, kiu konsisto devas taŭgi por tiuj rilatoj. De ĉi ĉio dependas ankaŭ la ebla formo de la konstruaĵo laŭ arta aspekto, kvankam alternativoj de tiu formo povas iomete elektati. Kiam juna infano konstruetas sian ludodometon, ĝi kutime komencas ĉe la bazo kaj, per provado kaj erarado, daŭrigas la laboron, ne havante antaŭe en sia menso ekzaktan finan rezulton. Ĝi lernas per imitado kaj erarado. Lerni lingvon similas al tio. La juna infano lernas ĝin ne sciante, nur malrapide supoz-imagante[7] la necesan konsiston de la lingvo. Ankaŭ lingvon ĝi lernas per imitado kaj erarado. Ĝi lernas la regulojn pri la konsisto de la lingvo en ĉirkaŭa, temporaba, vojo, kutime eĉ ne sciante pri tiu konsisto. La infano povas lerni lingvon en tiu nepraktika maniero, ĉar ĝia menso en tiu juna aĝo daŭre adaptiĝadas al tiu laborego.

La plenkreskulo lernas pli per sia inteligento. Same kiel la arĥitekto desegnas unue la tutan konstruaĵon, dum poste la metiistoj konstruas ĉiu sian propran parton, same tiel la instruisto instruanta novan lingvon devas instrui la lingvon konsiderante la tutan konstruaĵon, la gramatikon de la lingvo. La plenkreskula lernanto povas sukcese lerni la partojn de la gramatiko, nur se tiuj partoj jam de antaŭe interrilatas. Kaj kiel la konstruisto devas komenci per la bazaj partoj de la konstruo, ne per la tegmento, same la plenkreskula lernanto de lingvo devas komenci per bazaj konceptoj, kiujn la instruisto poste interrilatigas kun la pli „altaj" partoj de la strukturo. En tiu instruado do gravas, ke la lernanto komencu per tiuj partoj de la gramatiko, kiuj havas rektan interrilaton kun tio (kaj ankaŭ

[5] En la teksto ricevita de aŭstralia kolego la redaktantoj modifis kelkajn esprimojn pro stilaj aŭ lingvaj konsideroj. La modifetoj espereble ne tuŝas la esencan enhavon. La ŝanĝitaj esprimoj sekvas sube.

[6] La aŭtoro uzis la formon *jam antaŭe elverkis*, ĉi tie: 'estas (en la konsideretaj, supozeble oftaj aŭ kutimaj, momentoj) verkinta, farinta' [→*jam antaŭe elverkas*]

[7] *supozante* 'iom post iom venante al supozo' [→ supoz-imagante]

dependas de tio), kio poste baziĝos sur tiu baza strukturo. Oni ja ne unue lernigas la lernanton pri la akuzativo, antaŭ ol lernigi ŝin/lin pri la objekto de la frazo, nek antaŭ ol lernatigi la regulojn pri la finaĵoj de la vortspecoj kaj por la pluralo. Konsekvence, la instruistoj, personoj aŭ lernolibroj, sekvu sistemon, kiu respondas[8] al tio ĉi supre menciita. Ĝenerale ili faras tion, sed ne ĉiam. Kie ili faras tion, estas kie ili komencas lernigi la regulojn pri la finaĵoj de la vortspecoj, kaj la pluralon, kaj la artikolon, kaj tuj post tio la finaĵojn kaj uzon de la simplaj verbformoj. Post tio la objektan akuzativon, sekvatan de la elprepozicia akuzativo. Nur post ĉi ĉio supre menciita komenciĝas ĉe la instruistoj (kaj la lernolibroj!) la erara sekvordo, kaj tial oni[9] sube substrekos la idealan vicordon necesan por kelkaj gramatikaj temoj:

Unue pri la elprepozicia akuzativo (li venis lundon). Estas konsilinde[10] dekomence lernigi, laŭgrade, ĉiujn prepoziciojn kaj ilian uzon antaŭ ol trakti la elprepozician akuzativon. En la komencaj lecionoj uzu nur prepoziciajn prepozitivojn, do „li venis je lundo", kaj „dum proksima ĵaŭdo", kaj „al la lernejo" anstataŭ „lernejen". Tion sekvu la uzado de duobla prepoziciaĵo[11] „ĝis post la naŭa horo"; „krom en la ĝardeno ankaŭ en la domo"; „ŝi saltis al en la akvo"; „li metis ĝin al sur la tablo". Uzu multajn ekzemplojn de prepoziciaĵoj de „al" kun alia prepozicio. Nur en posta leciono instruu, kiam ŝanĝi, kaj kiam ne, prepozicion al akuzativo. Lernigu la diversajn regulojn por tiu ŝanĝado (= 1. Iu ajn simpla prepozicio, sed nur se la senco klaras, do, precipe ĉe kelkaj tempindikoj kaj ĉe „al"; 2. nur se estas „al" antaŭ dua prepozicio). Tiel lerniĝas unue la bazaj principoj kaj poste tiuj kiuj el ili sekvas.

---

[8] *korespondas* [→ respondas]

[9] *Ni* [→ oni 'la aŭtoro']

[10] *estas konsilinda* [→ estas konsilinde]. La aŭtoro uzis la strukturon *estas konsilinda*, kaj poste similajn plurloke, eble pro reformemo aŭ ia nekonata principo (vidu similan iniciaton de Johano Petik, en IPR 95/4, p.29-34). Se temas pri IPR, la redaktanto ĉe manko de nomforma subjekto preferas, laŭtradicie, e-formon; sed oni informas ĉi tie pri evidente alia prefero de la (ankaŭ ĉi-punkte reformema) aŭtoro, rekomendante al li uzi aliajn formon, ĝenron kaj forumon por prezenti reformideojn.

[11] *ante duoblan prepoziciaĵon* (→ de duobla prepoziciaĵo). La aŭtoro, reformeme, uzadas memstarigatan formon *ante* por enkonduki rektan objekton de agsubstantivo. Tion por konservi unuecan lingvaĵon de la revuo, la redakta kolektivo ŝanĝis, kun pardonpeto.

Dua grava, sed ofte ne sekvata, vicordo temas pri la t.n. participoj. Lasu ilin ĝis post lernigo de la pasivo kaj de la medialo (la pasivo kun la verba sufikso „-ati": *la aŭto lavatis de mia filo;* la medialo kun la verba sufikso „iĝi": la aŭto jam laviĝis pro la pluvo). Priekzercu[12] multe tiujn pasivon kaj medialon kaj iliajn tradukojn en pli ol unu verbojn en la angla lingvo. Nur longe post tio enkonduku la participajn adjektivojn, unue kiel epitetojn ĉe substantivoj, multfoje. Nur post tio kun la kopuloj: esti, resti, ŝajni, iĝi, montriĝi, fariĝi ktp., multfoje. Tio estas por montri, ke la participoj en E-o NE estas verboj, sed adjektivoj difinantaj substantivojn (aŭ pronomojn). Nur post tio oni klarigu la diversajn anglajn formojn kompleksajn de la verboj, kun iliaj tradukoj, komparante ilin kun la E-aj, se eble simplaj. Tio do okazas ne malproksime de la fino de la kurso. Se oni frue klarigas la kompleksan verbsistemon en la angla, la lernantoj kutimiĝas al tendenco laŭvorte traduki tiujn en E-on. Estus krome malutile[13] desegni paradigmojn por la participoj, kun angla traduko, ĉar ili estas en E-o simple adjektivoj kun adjektivaj signifoj. Utilas peni doni al ĉiu adjektivparticipa sufikso ĝian propran signifon, ĝian aspekton por iu ago. Konsiderinte la ĉi-supron, ni konscias, ke nur post la traktado de la participaj adjektivoj[14] ni klarigu la uzon de la participaj adverboj, komencante per multaj ekzemploj sen komplemento (li legas ĉiumatene la ĵurnalon manĝante), kaj poste kiel determinatoj en reduktitaj subpropozicioj (li manĝas, legante la ĵurnalon de la komenco ĝis la fino). Se lernanto scivolas pri la fakto, ke (nur) la finaĵo -at- havas du signifojn, klarigu ke (nur) -at- estas uzata kiel verba sufikso participa, kaj tiam havas la reduktitan signifon „pasiva voĉo" nur (la paketo retrosendatis), dum la adjektiva -at- signifas kaj pasivon kaj nefinitecon (la soldatoj estis ekzercataj, kiam la bombo mortigis ilin).

Tria konsilo estas, ke oni antaŭ ol klarigi kaj praktiki la fiktivan kondicionalon (mi aĉetus helikoptron[15], se mi havus la monon), oni praktiku la realigeblan supozan kondiĉon (mi ĝojos, se ci morgaŭ vizitos min), en la tri tempoj. Tio estas por alkutimigi la lernantojn al pli multa uzo de la indikativo en tiaj kondiĉaj frazoj, ol al uzo de la kondicionalo, tro ofte uzata en Esperanto.

---

[12] *Ekzercu* (→ Priekzercu… [aŭ: ekzercu la kursanojn/lernantojn en/pri…])
[13] *Estus malutila* (→ estus malutile)
[14] *ante participajn adjektivojn* (→ de participaj adjektivoj [aŭ: de participadjektivoj])
[15] *Helikoptron* (→ helikopteron)

Kvara konsilo: Dum la personaj pronomoj lernatu en la komenco de la kurso, la korelativaj pronomoj atendu iomete, certe ĝis post la klarigoj de la objekta akuzativo kaj la adjektoj[16]. Por la adjektoj la vicordo estu: unue montru ilin kiel prepozitivojn, post tio kiel elprepoziciajn akuzativojn (kie la prepozicio ŝanĝiĝas al akuzativo), kaj nur fine, kiamaniere el la prepozitivoj disvo1viĝis la adverboj (en rapida maniero → rapidmaniere → rapide), kaj kiel en E-o ili simple originas el adjektivoj (rapida → rapide). Ne forgesu mencii la kelkajn originalajn adverbojn.[17]

Kvina konsilo: estas necesege,[18] antaŭ ol trakti la kaŝitajn medialojn (bruniĝi, profesoriĝi), unue klarigi la puran medialon (la ŝtono laviĝis en la marakvo; Ateno troviĝas en Grekujo; ŝi sendube konsideriĝos esti la gajninto). Sekve ankaŭ la diferencon inter „sidiĝi" (= sidigiĝi) kaj „eksidi" (= intence). („Bruniĝi" = *to get* (= iĝi, = medialo) *into a state of brownness* (= bruni[19]) *as if somebody or something not mentioned is behind* (= igi) *this action*; *so*: brunigiĝi *shortened* to bruniĝi).

Sesa konsilo: NE samtempe traktu „-iĝi" kaj „-igi", ĉar ili neniel interrilatas escepte ke verboj kun -iĝi estas hazarde sed nature: netransitivaj; kaj verboj kun -igi: transitivaj. Ne forgesu, ke transitiveco aŭ netransitiveco de -igi resp. -iĝi ne indikas la signifon de tiuj sufiksoj (ili havas specifajn signifojn), sed estas nur gramatikaj klasoj. Do havu kelkajn a1iajn lecionojn inter la du. Neniam diru ke oni uzas -igi kaj -iĝi por transitivigi, kaj netransitivigi verbon, respektive (tio ne estas vera); sed ke verboj kun „-igi" estas transitivaj pro la signifo de „-igi", kaj ke verboj kun „-iĝi" estas netransitivaj pro la signifo de „-iĝi".

Sepa konsilo: nur post ol trakti la subjunkciojn en subpropozicioj oni enkonduku la rektajn demandojn, kiuj forme estas subpropozicioj: [mi demandas,] ĉu ci bezonas mian helpon?

Oka konsilo: Traktu la aritmetikajn esprimojn kune, klarigante ke ĉiuj esprimiĝas per sufikso, eĉ -poa, sed ke por -poa oni ĝenerale ankoraŭ uzas la prepozicion „po" (ili marŝis po kvar = ili marŝis ĉiulinie kvarope = en grupoj de kvar).

---

[16] *ante la objektan akuzativon kaj la adjektojn* [→ de objekta akuzativo kaj la adjektoj]

[17] Primitivajn adverbojn (tuj, nun), aŭ-adverbojn (hodiaŭ). [Red.]

[18] *Estas necesega* [→ estas necesege]

[19] Pri la „statuso" de *bruni* oni povus diskuti… (redaktantoj)

Naŭa konsilo: Oni certigu frue kaj nekompate ke la prononcado[20] de la lernantoj estu perfekta.

Deka konsilo: Substrekadu, ke lernanto de E-o devas rekrei la lingvon same kiel ĉiu esperantisto (inkl. Zamenhof) faris, sur la bazo de la malmultaj reguloj gramatikaj kaj de la malgranda stoko de (oficialaj) radikoj, per alikategoriigado, per riĉa uzo de la afiksoj (= derivado), kaj per eĉ pli riĉa kunmetado de du aŭ tri vortradikoj.

Komentoj de Blazio VAHA, nome de la Scienca Komitato de IPR

1) Estas evidente, ke la aŭtoro konsideras antaŭ ĉio malfacilaĵojn (ne tute ĝenerale, sed prefere) por anglalingvanoj. Tamen li ne atentigas pri tio, pri tiu specifeco, klare: tiel liaj postuloj estas tro fortaj. Ĉe alia fona lingvo la situacio povas esti alia.
2) La artikolo montras aliron gramatik-centran. Estas diskuteble, ĉu duoblaj prepozicioj, kiuj ne estas tre kutimaj, devus esti *intense* instruataj pli frue, ol la solvoj kun akuzativo. Laŭ aliaj vidpunktoj estas pli bone konatiĝi unue kun formoj pli kutimaj. Lernantoj alproprigas ankaŭ frazojn konkretajn, ripeteblajn multfoje kaj tutece, ne nur skemojn de gramatikaj strukturoj.
3) Kompreneble, la aŭtoro rajtas prezenti sian opinion (malgraŭ la supraj kritikaj mencioj).
4) Aliaj punktoj (pri hierarĥio de gramatikaj konoj, pri sinsekvo de participoj kaj verboformoj, pri indikativo kaj kondicionalo, pri nesamtempa instruado de -iĝ- kaj -ig- ktp. estas klare pravaj.
5) Estus inde referenci je similtemaj studoj, eĉ ne samopiniaj.
6) La artikolo enhavas elementojn de reformemo. Tion estus pli bone apartigi, sed se ne, almenaŭ montri pli klare, ke la aŭtoro kelkpunkte elpaŝas reformeme.
7) La artikolo estas nepre aperiginda, posta diskuto estas ebla.

El la landoj kaj sekcioj…

Aŭstralio

Pasintjare la universitato de Novsudkimrujo en Sidnejo (Aŭstralio) okazigis 6-monatan (148-horan) kurson por trejni E-instruistojn kun partopreno de tri personoj. Dum parto de la kurso ili ĉeestis komunajn lecionojn kun studentoj kiuj lernas instrui aliajn lingvojn, sed estis lecionoj ankaŭ nur por

[20] *Prononcado ate de la lernantoj* [→ prononcado de la lernantoj]

la esperantistoj kun profesoro *Daniel KANE*. Ili lernis instrui laŭ la komunikmetodo. La universitato funkciigis pasintjare ankaŭ 9-semajnan kurson por komencantoj kaj la tri estontaj E-instruistoj tie havis la eblon ekzerci sin pri la instruado en vera klaso. Por ricevi la diplomon ili devis krei instrumaterialojn por 20-hora E-kurso.

Informis: Nicole ELSE, <nicole@cryogenic.net>

Aŭstrio

Kolokvo pri E-aj bibliotekoj kaj arkivoj okazos 19-20 oktobro 2007 en la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno kun la titolo *Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj* (*Esperantomuzeo*, *Mollardgasse 9, AT-1010 Wien, plans prachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm*):

– D. BLANKE: Planlingvaj arkivoj – problemoj kaj praktikaj spertoj
– T. WITKAM: Provlegado post skanado – Homo kaj teĥnologio
– H. MAYER: Tradicia biblioteko – kaj defioj de novaj teknikoj […]
– M. MALOVEC: E-bibliotekoj en Ĉeĥio kaj disponigo de libroj elektronike
– Á. MÁTHÉ: Periodaĵoj en bibliotekoj kaj libraroj
– M. BLAHUS: Propono pri starigo de interreta superkatalogo […]
– U. MAIER/K.H. SCHAEFFER: La Germana E-Biblioteko Aalen […]
– A. MONTAGNER: Bibliotekoj kaj Esperanto: Ĉu alia aparta mondo?

Brazilo



S-ino Elvira Fontes (1916-2007) forpasis la 25-an de aŭgusto, en San-Paŭlo, kun la aĝo je 91 jaroj el kiuj pli ol 40 ŝi plene dediĉis al E-o. Ŝia laboro por la e-ista movado koncentriĝis ĉefe en E-Asocio de San-Paŭlo, kie ŝi agadis interalie kiel gvidanto de plurnivelaj kursoj, direktoro de la departemento pri instruado kaj kiel prezidanto mem de la Asocio dum 10 jaroj. Dum multaj jaroj ŝi redaktis ties oficialan organon *La Lampiro*.

Ŝi konatiĝis kun E-o komence de la 60-aj jaroj pere de la tiam fama municipa kurso de E-o kie poste ŝi fariĝis unu el la plej agemaj kunlaborantoj. En la 70-aj jaroj ŝi gvidis kurson de E-o en la publika TV Kulturo – de *Fondaĵo Pastro Anchieta*, kaj krome unufojon semajne artikolis pri E-aj temoj por unu el la tiamaj plej popularaj taggazetoj *O Diario Popular*. En 1975 ŝi fariĝis la estro de la brazila sekcio de ILEI kaj dum pluraj jaroj estris la sekcion. Kiel sekciestro, ŝi gvidis interalie labor-

kunsidojn por instruistoj, kies ofteco estis trimonata, kaj plurnivelajn ekzamensesiojn kadre de la Brazilaj Kongresoj de E-o, laŭ la invito de Brazila E-Ligo. Dum kvar jaroj sub ŝia redaktoreco eldoniĝis la sekcia bulteno *Milde*, kies unua numero aperis en 1998. Ŝi estas aŭtoro de du lernolibroj, *Unuaj paŝoj* kaj *Survoje al Esperantujo*, ankoraŭ tre uzataj de multaj E-grupoj tra la tuta lando. Pro siaj laboroj favore al E-o, ŝi iĝis honora membro de E-Asocio de San-Paŭlo, Brazila E-Ligo kaj UEA.

Bulgario

AKEL-2 renkontiĝo en Bulgario

E-instruistoj de Bulgario, Italio, Britio kaj Hispanio efektivigas Socrates-Comenius-porlernejan projekton AKEL (*Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj*) por evoluigi la mondkoncepton de la junaj homoj en la unuiĝinta Eŭropo. AKEL-2 okazis 15-22 aprilo en mezlernejo de Canko Cerkovski en Polski Trambeŝ, Bulgario. Ĝia temo estis: „Kutimoj kaj tradicioj aŭ kiamaniere festas mia popolo". [*Surfote: litovinoj kun britoj*]



Lernejaj teamoj preparis komputilan prezentaĵon pri la temo, kunhavis aĵojn por ekspozicio, partoprenis en internacia koncerto en la urba kulturdomo ktp. Eseoj de gelernantoj laŭ la temo „Eŭropcivitaneco" aperos en aparta eldonaĵo.

laŭ la informoj de Genovaitė LIEPINIA (Litovio)

Burundo

Seminario – antaŭprepare al la ILEI-Konferenco en Benino – okazos inter la 22-a kaj 29-a de marto 2008 kun la titolo: *Instruado de Esperanto por evoluigo de la afrika kulturo.* Okazos E-kursoj por progresantoj/intoj el pluraj afrikaj landoj, kiuj intencas partopreni la ILEI-konferencon kaj ekzameniĝi por esti E-instruistoj en Afriko. Estos kursoj por lokaj komencantoj en Rumongo, kiu troviĝas sude de Burundo, 72 km-ojn de Buĵumburo, ĉe la limo de Burundo, Kongo kaj Tanzanio. La seminariejo troviĝas apud la ŝip-haveno en religiula hotelo. Rumongo estas turisma regiono kun multaj plaĝoj, belaj pejzaĝoj, montoj, hoteloj kaj vidindaĵoj. Oni aparte serĉas eksterafrikajn instruantojn kaj studgvidantojn, kiuj povus proprakoste (almenaŭ parte) partopreni.

Afrika Oficejo de UEA, BP 416, Lokossa-Mono, Benino
Tel: +229 22 41 02 29, <afrika.oficejo@esperanto.org>
Informoj ankaŭ ĉe SABIYUMVA Jérémie: BP: 170 Rumonge, Burundo
<jerrybs21@yahoo.fr>

Ĉinio

Fine de junio 2007 finiĝis du E-kursoj en la urbo Kantono. Unu el ili okazis en universitato, kun gvido de la ĉina profesoro, Ĝenerala Sekretario de la E-Asocio de Kantono, s-ro LIU Weizhuang, kaj de la hispano Augusto Casquero, kaj tie oni disdonis la koncernajn diplomojn al la lernantaro.



La dua kurso okazis en la sidejo de la E-Asocio de Kantono, gvidata de Augusto CASQUERO. Ambaŭ kursoj estis sukcesaj, kaj ĉiuj montris la deziron daŭrigi la lernadon de E-o. *Augusto CASQUERO*

Finnlando

En la Popola Instituto de Valamo, Finnlando 23-27 julio okazis E-kurso kun 9 kursanoj el Finnlando, 2 el Svedio kaj 1 el Nederlando. La ĉi-jara kurso estis la 8-a sinsekve kaj – same kiel la ĝisnunaj kursoj – estis aranĝita en bona kunlaboro inter la Popola Instituto kaj E-Asocio de Finnlando. La ĉefinstruisto estis Atilio ORELLANA ROJAS, kursogvidanto kaj helpinstruisto Tiina OITTINEN. Venontjare la kursosemajno okazos verŝajne fine de junio, la tempo estos fiksita plej eble baldaŭ. Pliaj informoj ĉe *www.esperanto.fi*. Bonvenon!

laŭ Tiina Oittinen sekretario de E-Asocio de Finnlando,
<eafsekretario@esperanto.fi>

Germanio

Polaj kaj germanaj infanoj dum du semajnoj en Herzberg

Jam la duan fojon ripetiĝis la dulanda *Somera Arbara Lernejo (Salo)*, kiu ĉiujare kunigas dum duona monato E-lernantajn infanojn inter 12 kaj 16 jaroj el la ĝemelurboj Góra (Pollando) kaj la E-urbo Herzberg (Germanio). Dum la kunestado de la 28-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto ili interrilatis en la internacia lingvo en amika internacia etoso sub la gvido de instruistoj. En siaj artikoloj la gazetaro emfazis, ke la ĉi-jara aranĝo karakteriziĝis per elstare riĉa programo, prizorgita de la loka Esperanta Interkultura Centro. Fakte, la infanoj estis dorlotitaj: ili amuziĝis en glitejo kaj naĝejo, lernis arkopafi, dancis diverslandajn popoldancojn, vizitis bestoparkon, esploris groton, ekskursis al turismaj lokoj, publike koncertis en E-o kaj migradis en arbaro. Ne mankis, kompreneble, instrua parto, konsistanta el praktikado de la lingvo kaj fina ekzameno. La partopreno en la renkontiĝo estis senpaga, ĉar ĉiuj kostoj estis kovritaj de la du urboj, la Pol-Germana Junulara Fondaĵo kaj privataj sponsoroj. Tre impresa estis la favoro de la urbestro, Gerhard WALTER, kiu oficiale akceptis kaj regalis la partoprenantojn en la urbodomo, persone gvidis tablotenisan turneon (kaj eĉ ludis en ĝi kun la infanoj), disdonis pokalojn kaj donacojn, prezidis diversajn publikajn aranĝojn kaj plurfoje vizitis la kunvenojn.

Hungario

La 28-an de julio, kadre de la festivalo IRIS (Inter-Regiona Internacia Semajno, 21-29 julio) en la urbo Zalaegerszeg, estis organizita la *4-a Landa E-instruista Ronda Tablo*. Kunorganizintoj: Hungaria E-Asocio (HEA, hungare: MESZ), Asocio de Hungariaj E-Instruistoj (EPME)[21] kaj la Fremdlingva Plukleriga Instituto (ITK).



Prezidio de la rondtablo (de maldekstre): Ladislao Szőke (MESZ), Emeriko Szabó (ITK/EPME), Jozefo Baksa kaj Jozefo Eszényi (ILEI-HU/MESZ)

La kunvenon partoprenis pli ol 40 E-instruistoj, kiuj interŝanĝis spertojn pri la ŝtata lingvoekzamena sistemo, pri la aplikeblaj instruhelpiloj, instrumetodoj kaj pri la aktualaj stato kaj problemoj de la E-instruado en Hungario. En Hungario Esperanto havas lokon en la ŝtata abiturienta sistemo (danke al la agado de Márta KOVÁCS, Zsuzsa GADOS-TÖTÖS., Pálma CSISZÁR-SALOMON k.a.). En tiu ĉi jaro oni povis abiturientiĝi en mezgrada nivelo pri

[21] EPME estas jure registrita asocio, kies pli grandan parton konsistigas la membroj de ILEI-HU. La prezidanto de EPME estas samtempe la sekciestro de ILEI-HU.

16, en nivelo de „altigita grado” pri 15 lingvoj. Pri E-o fine de majo ekzameniĝis mezgrade ses, altgrade du mezlernejanoj.
Kun partopreno de 16 personoj, meze de majo estis organizata trejnado por esperantistaj instruistoj/antoj en la urbo Kecskemét. La ĉeforganizanto estis „Csillag-ász Regionális Eszperantó Alapítvány” (Astronomia Regiona E-Fondajo). La ĉeftemo de la unua tago estis spertinterŝanĝo: kiu kiel instruas, ĉu nur individue aŭ ankaŭ grupe? Ni serĉis (kaj trovis) solvojn je diversaj problemoj en la instruado de E-gramatiko. La ĉeftemo de la dua tago estis kompili detalan kalendaron ĝis la somero de 2008 kun multe da interesaj, edukaj, sportaj, kulturaj programoj, kien oni povus inviti la lernantojn por ke ili vidu, ke E-o temas ne nur pri la lingvodiplomo. La ĉeestantoj decidis, ke aŭtune ili denove renkontiĝos por simila kunveno en la urbo Nyíregyháza.

Kroatio

Konkurso pri scio de E-o por gelernantoj okazis 25-27 majo en Kostrena. Tio estis jam la sesa konkurso, tradicia, kiu ankaŭ strebas esti internacia. Samtempe en Kostrena okazis renkontiĝo de junaj esperantistoj el Kroatio. Ĉi-jare partoprenis 21 gelernantoj el 6 elementaj lernejoj kaj 3 mezlernejoj



el Zagrebo, Rijeka, Sveti Kriľ Zaĉretje, Sesvete kaj Dubrava Vrbovečka. La nuna konkurso estis organizita kiel parto de la programo de la 100-jara datreveno de la fondo de E-societo en Rijeka kaj ankaŭ en Kroatio. Inter elementaj lernejoj por komencantoj la unuan premion gajnis Dominik RADELIĈ kaj por progresantoj Dora HÖLBLING. Inter la mezlernejoj la unuan premion gajnis Anĝela KANJUO. La Pokalon Kostrena gajnis la elementa lernejo Mladost el Zagrebo. Al ĉiuj partoprenantoj estis donitaj diplomoj por partopreno kaj la libroj de la kroata verkistino *Antoaneta Klobuĉar*. Ni invitas vin ke venontjare ankaŭ vi partoprenu!

***

En la 40-a konferenco Kroation reprezentis ses virinoj: Spomenka ŠTIMEC, Marija JERKOVIĆ, Zlata NANIĆ, Jagoda ČALDAREVIĆ, Mirjana ŽEŽELJ kaj Višnja BRANKOVIĆ. Per siaj prelegoj ili prezentis la kroatan kulturon kaj lingvon. Spomenka Štimec prelegis pri verkistinoj en E-kulturo kaj Marija JERKOVIĆ pri kroataj verkistinoj kiuj per E-o atingis la japanan kulturon: unua estis Ivana BRLIĆ-MAŽURANIĆ nomata „kroata Andersen" kies verko *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* estis tradukita en pli ol dudek lingvojn kaj ankaŭ en E-on. La dua konata verkistino kiu kontribuis multe kaj ankoraŭ kontribuas al E-movado kaj literaturo, pri kiu Marija JERKOVIĆ prelegis, estas Spomenka ŠTIMEC. Ŝiaj verkoj, la plej konata *Ombro sur interna pejzaĝo*, estis premiitaj pro siaj kvalito kaj valido. Dum la *Lingva Festivalo*. Marija JERKOVIĆ kaj Jagoda ČALDAREVIĆ prezentis la kroatan lingvon vestitaj en naciaj kostumoj kaj al la partoprenantoj donacis naciajn memoraĵojn. Dum la adiaŭa vespero la kroatinoj dancis kaj kantis naciajn kantojn, prezentis sian landon bele.

Marija JERKOVIĆ, sekciestro (KEL)

Salvadoro

Eĉ se nur kun tri lernantoj, finiĝis la unua E-kurso en Salvadoro. Ĝin gvidis Eduardo NAVAS uzante la lernolibron de Miguel GUTIÉRREZ ADÚRIZ. Artikolon, filmetojn kaj fotaron pri la kurso vi povas trovi en la hejmpaĝo de *E-o en Salvadoro*: http://www.esperanto-sv.co.nr/ La retadreso de Eduardo NAVAS: <*aliamondano@gmail.com*>.



[*Surfote: Ramón, Ismael kaj Williams 23 junio 2007 ĉe la Nacia Universitato*]

Togolando

23-28 julio 2007 okazis kursoj en la Instituto Zamenhof (Lomé). La kursojn gvidis s-roj ATTAGLO Elom, AGBOLO Didier kaj DOUMEGNON Koffi. Ĉeestis ankaŭ GBEGLO Koffi kiel konsilanto. Estis 3 niveloj: en la unua lernis ĉ. 25 komencantoj laŭ la *Zagreba Metodo*; en la dua ĉ. 15 personoj jam kun la diplomo pri Zagreba Metodo perfektigis sian scion. La lecionoj temis pri gramatiko/vortfarado kaj E-kulturo. La kursanoj estas prepritaj por trapasi ekzamenon laŭ *La Komuna Eŭropa Referenckadro*; en la tria lernis 11 personoj, ili prepariĝis por la elementa nivelo de ILEI/UEA-ekzamenoj.

laŭ informoj de GBEGLO Koffi, <esp.togo@cafe. tg>

Ukrainio

29-30 junio en la Ternopila nacia pedagogia universitato nomita laŭ V. Hnatjuk okazis scienca konferenco "E-o en la XXI-a jarcento: la stato kaj perspektivoj omaĝe al la 100-jara datreveno de la E-lernolibro por ukrainoj de Miĥajlo JURKIV". Ĝin organizis la Ternopila urba E-klubo „Spinosfloro", Filantropa Fondaĵo kun la nomo de Vasil JEROŜENKO „Espero", UkrEA kaj instruistoj de la universitato.



La unua ukrainlingva E-lernolibro, kiu aperis en la jaro 1907, fakte estas la simbolo de aliĝo de ukrainoj al la atingoj de la interlingvistika mondo. La raraĵo estis reeldonita okaze de la jubileo pere de Niko VOLOŜIN.

En la prelegoj oni substrekis la historian signifon de la unua lernolibro kaj de la dua lernolibro de O. KUZJMA (1922) por la nacia kaj kultura renesanco en Ukrainio, kies partoj apartenis al la Aŭstro-Hungaria kaj Rusa imperioj komence de la 20-a j.c. (I. HALAJĈUK, D. BUĈKO). Tre bone estis montrita la rolo de la tradukitaj verkoj de T. ŜEVĈENKO, la fabeloj kaj legendoj de V. JEROŜENKO, la popolaj kantoj, la ukraina E-periodaĵo por konatigi la E-mondon kun la riĉa ukraina kulturo (V. PACJURKO, E. KOVTONJUK, P. ŜIMKIV). T. POPOVA kaj V. POGORECJKA konvinke parolis pri la efika uzado de E-o en la turismo; M. ROSTOCJKA – pri perspektivoj de E-o en Eŭropa Unio kaj internaciaj rilatoj. La demandojn de la evoluo de E-o kaj la ukraina lingvo pritraktis N. DANILJUK, L. STRUHANECJ, I. KOĈAN, O. HUZAR. Pri la riĉa historio de la Ternopila E-klubo (1997-2007) interese rakontis R. ROMAN, pri E-fontoj en la Ternopila regiona muzeo – la direktoro S. KOSJUK.

La scienca kaj organiza nivelo estis sufiĉe alta (partoprenis 4 doktoroj de sciencoj, 4 kandidatoj de sciencoj, interesiĝantoj el Ternopil, Kijiv, Lviv, Pustomiti, Ivano-Frankivsjk, Odesa, Lucjk). Gravas, ke estis aliĝintaj aŭtoritatoj ankaŭ el eksteresperanta scienca medio. Fine de la konferenco estis akceptita rezolucio kun rekomendoj pri disvolvo de E-o en Ukrainio. La partoprenantoj esprimis la deziron, ke similaj konferencoj estu periodaj en superaj kaj mezaj lernejoj de Ukrainio.

Nina DANILJUK, sekciestro

Pri edukado, instruado kaj ILEI dum UK

Subkomitato pri Edukado – 5 aŭgusto

La kunsido estis gvidata de Atilio ORELLANA ROJAS, kaj temis pri edukado, ĉefe pri ekzamenoj. Pri la ekzamenado la kunsido ricevis informojn pri la stato de evoluo pri la Eŭropa referenc-kadro por ekzamenoj, kiujn ILEI esperas funkciigi antaŭ la kongreso 2008. Pri la instruado de E-o la subkomitata kunsido ricevis informojn pri universitato en Kalifornio, kiu aldonis al la oficiala kursaro retan E-kurson. Krome la projekto *Springboard to languages* antaŭvidas, ke kvar lernejoj en Anglio uzos la projekton ekde septembro 2007, kaj kiu donas helpon al lernado de angla gramatiko al 7-

11-jaraj infanoj. La subkomitato konstatis ke *lernu.net* kreska kontentige. La subkomitato rekomendis al la Komitato la sekvajn:
– ĝi akceptu la proponitajn ŝanĝojn de la Regularo de la elementa kaj meza niveloj de la internaciaj ekzamenoj de ILEI kaj UEA.
– La estraro interkonsentu kun ILEI, ke ILEI taskiĝu pri normigo de la taksado de instrukapablo.

Kleriga Lundo – 6 aŭgusto

La plej interesa kaj diskutenda temo estis: „Lingvaj festivaloj". Dennis KEEFE tre detale klarigis la metodikon de organizado de lingvaj festivaloj. Tiaj okazas jam en multaj landoj kaj proponas bonajn eblecojn prezenti E-on al la publiko. Sed la ideo, ke e-istoj mem okazigu prezentadon de aliaj lingvoj, ŝajnas esti tempo-malŝparado. Bude partopreni jes – organizi ne! Jose Antonio VERGARA proponis, ke oni havu lingvan festivalon por lok-anoj okaze de UK-oj, kio montrus subtenon de la lingva kulturo. Tia ideo eventuale estas taŭge adaptebla. *kompilis Jozefo BAKSA (Hungario)*

La Tago de la Lernejo – 7 aŭgusto

Post la malferma saluto nome de ILEI (Mihai TRIFOI) kaj la salutoj nome de la japana ILEI-Sekcio (Tieko ISIKAWA), de AIS (Maŭro LA TORRE), de IEI (Atilio ORELLANA ROJAS) sekvis serio de 14 prelegoj.
Oni parolis pri „E-kurso kiel oficiala lernobjekto en lernejo" (Takesi SIMATANI), pri „Unika instruado de E-kurso" por kompreni alilandajn homojn kaj kulturojn (Ricuko HUĜIMOTO), pri la „Altlerneja E-agado en Liaoning-provinco de Ĉinio" (WU Guojiang)[22], pri „E-instruado en Koreio" (LEE Jung-kee), parolis pri „Instruado de E-o en Irano" (Reza TORABI), pri la sperto „Instrui E-on en Eŭropo, en Ĉinio kaj en Hinda Unio" (Dennis KEEFE).
Estis prezentitaj „Kelkaj eŭropaj instru-projektoj de E-o" (Mihai TRIFOI), la projekto „Lingvolanĉilo" („Springboard", Paul GUBBINS) kaj „La rolo de internaciaj instru-projektoj en Herzberg, la E-urbo" (Zsófia KÓRÓDY), la projekto „E-o per rekta metodo" (Stano MARČEK) kaj la metiejo de edukado.net (d-ro Katalin KOVÁTS).

[22] Vidu lian prelegon sur p. 10-a en la nuna numero de IPR – NdlR

La Tago de la Lernejo finiĝis per kvar prelegoj: „Referenckadro (KER) kaj memtaksado laŭ la eŭropaj normoj" (Katalin KOVÁTS), „Novaj ILEI/UEA-ekzamenoj laŭ la Referenckadro de la Konsilio de Eŭropo" (Zsófia KÓRÓDY), „La evoluo de la projekto *lernu.net*" (Bertil WENNERGREN) kaj „BEK - Nova ekzercaro pri sufiksoj kaj prefiksoj" (Dennis KEEFE).
La Tago de la Lernejo okazinta ĉi-jare en Jokohamo estis bona nova okazo por interŝanĝo de spertoj por multaj E-instruistoj.

laŭ la informoj de Mihai TRIFOI (Rumanio)

Pinĉilumado kaj paroligaj lecionoj

kun *www.edukado.net*

Nia teamo lanĉis novan paroligan aktivaĵon dum la ĉi-jara UK kaj ĝi havas ŝancon fariĝi tradicio dum E-kunvenoj kaj aranĝoj. La ideo estis, ke helpe de iu markilo komencantoj povu indiki, ke ili volonte babilus kun la celo plibonigi sian E-on, kaj la pli spertaj parolantoj de la lingvo esprimu sian pretecon konversacii eĉ kun komencantoj.



Katalin Kováts (edukado.net) kaj Tieko Isikawa (sekciestro de ILE-JP)

Helpe de tiu maniero oni facile povas trovi babilpartnerojn. Post cerbumado ni elektis verdajn kaj ruĝajn vestaĵpinĉilojn, por kies fiksado kaj malfiskado oni bezonas nur sekundojn, sekve la disponeblo estas facile kaj rapide indikebla. Antaŭ la kongreso ni devis disvastigi la ideon, trovi pinĉilojn en la taŭgaj koloroj kaj liver(ig)i ilin al Jokohamo. Fine ĉio sukcesis ĝustatempe kaj sen kaptiĝi ĉe la japanaj doganistoj iom pli ol 2000 pinĉiloj atendis la kongresanojn ekde la unua vespero de la kongreso. Tie jam dum la *Movada Foiro* centoj da kongresumantoj povis ekipi sin surloke per verda aŭ ruĝa vestaĵpinĉilo depende de la intenco esti helpata aŭ esti helpanto en la ekzercado de E-o. Dum la malferma ceremonio Renato CORSETTI klarigis la uzregulojn kaj faris alvokon al la apliko de la paroliga ludo. En la disvastigo helpis ankaŭ la klarigteksto aperanta kun foto pri pinĉilo en kongresa kuriero.

Ni persone disdonis ilin ankaŭ en aliaj lokoj de la kongresejo kaj lasis amason da pinĉiloj ankaŭ ĉe la giĉetoj, kie la helpantoj de la kongreso volonte partoprenis en la varbado. Estis agrable vidi novajn kaj jam konatajn samideanojn, dekoritajn per niaj pinĉiloj, kiuj laŭ la devenlandoj estis tamen diversaj en siaj formoj kaj koloroj. Laŭ la enketoj la pinĉiloj jes ja atingis la celon, ebligis senĝenan interkonatiĝon por multaj esperantistoj, kiuj mem ne vere kuraĝintus alparoli aliajn. La verdpinĉiluloj kortuŝiĝis de la helpemo de la ruĝuloj, el kiuj pluraj bone eluzis la eblon helpi kaj instrui. Ni vidis ankaŭ plurajn, kiuj kameleone, depende de la situacioj kaj alvenantaj alipinĉiluloj aŭ ŝanĝis siajn pinĉilojn de unu al la alia koloro, aŭ jam dekomence uzis la memfabrikitan hibridan version.

El ĵusricevita raporto ni eksciis, ke dum unu el la kongresaj ekskursoj la gvidanto klopodis sidigi la pasaĝerojn helpe de pinĉiloj, por ankaŭ tiel zorgi pri la eventuala helpo de la ruĝuloj. Sume la kampanjo bone sukcesis, kaj la restantajn plurcent pinĉilojn ni celas ekuzi certe en la sekva UK, en Roterdamo, aŭ en aliaj internaciaj aranĝoj kaj kunvenoj. Iru aparta danko al la kvar ĉefaj sponsoroj kaj helpantoj: al s-roj H.-Georg MACIOSZEK (Germanio) kaj Thu Xuan NGUYEN (Vjetnamio), al s-ino Joëlle CORROY (Belgio) al la familio SLEZÁK (Hungario) kaj al deko da aliaj samideanoj el Japanio, Aŭstralio kaj Italio, kiuj per transportado kaj donacpinĉiloj helpis lanĉi la pinĉilumadon.

Kiel jam kutime ankaŭ ĉi-jare ni okazigis **paroligajn kursojn**. Mi, Katalin gvidis la kurson por komencantoj kaj Sylvain okupiĝis pri la mezniveluloj.

Ni okazigis entute 16 lecionojn, kiujn partoprenis ĝenerale de 50 ĝis 100 personoj, entuziasmaj, lernemaj. Kvankam estis japana plimulto, ankaŭ alilandaj grupoj, individuoj ĝuis la komunan lernadon kaj ekzercadon kaj kun intereso uzis la eldonaĵon Poŝamiko. Ni ĉi-loke deziras danki s-ron Kobayasi MASAYUKI (Japanio) kaj s-ino Birke DOCKHORN (Germanio-Koreio) por ilia organiza helpo.



Laŭ niaj spertoj en la dua nivelo observeblis tro granda diferenco en la lingvoniveloj. Ofte sidis en la grupoj personoj, restantaj surloke post la porkomencanta leciono kaj samgrupe volis ekzerciĝi ankaŭ progresantoj. Lerninte el tiuj spertoj por la sekva jaro ni okazigos ĉiutage duhoran kurseton por komencantoj kaj paralele kun ili unu lecionon por mezniveluloj kaj unu por progresantoj. Ĉiukaze ĝis la UK en Roterdamo sekvu nin tra niaj materialoj, vizitu regule la paĝaron kaj sendu vian opinion al la redaktora adreso.

Katalin KOVÁTS (Nederlando-Hungario)

Resume pri la 40-a ILEI-konferenco

Virinoj en Esperanto-kulturo

Al la konferenco en Ranzan, Japanio (11-19 aŭgusto) aliĝis 70 personoj el 23 landoj. Ĝi estis ne perfekta, sed agrabla laŭ opinioj de pluraj partoprenantoj. Verdire la konferenco komenciĝis jam antaŭ la oficiala komenco, eĉ antaŭ la alveno al Ranzan, ĉar ni havis luitan buson por kune veturi post UK, sed niaj valizoj estis tiom multaj kaj tiom grandaj, ke kelkaj volontuloj devis veturi per trajno. Dum somera feria tempo en Japanio aŭtoŝoseoj estas vere okupitaj kaj tiuj, kiuj veturis per trajno, alvenis samtempe kun tiuj, kiuj veturis per buso...

Ĉiuj (aŭ preskaŭ ĉiuj) E-aranĝoj komenciĝas per *interkona vespero* aŭ io simila (ekz. *Movada Foiro* dum UK). ILEI havas novan, sed tre ŝatatan tradicion – dum la unua vespero oni ne nur prezentiĝas, sed ankaŭ iomete prezentas siajn landon kaj kulturon – ni inventis interkonan/manĝvesperon. Eĉ se ĉiu alportis nur ion etan (ja pli gravas amuze prezenti la alportitaĵon), la tablo iĝis vere bunta, la partoprenantoj ne nur interkonatiĝis, sed iĝis geamikoj.

La plej grava kaj interesa tago de la konferenco estis dimanĉo, la 12-a de aŭgusto – en tiu tago okazis unutaga *simpozio* laŭ konferenca temo. Por plifaciligi la partoprenon de tiuj, kiuj partoprenis en UK, ĝi okazis unu tagon post UK, tiel ĝin partoprenis ne nur konferencanoj, sed venis ankoraŭ kelkaj pliaj personoj. La *inaŭguron* de la konferenco prezidis vicprezidantino de ILEI, Zsófia KÓRÓDY, salutvortojn diris estrarano de UEA Ranieri CLERICI, reprezentanto de JEI kaj japana ILEI-sekcio (+ ĉefa loka organizanto) Tieko ISIKAWA, estis laŭtlegitaj salutvortoj de la prezidanto de ILEI kaj tiu de AIS. Poste sekvis salutparolado de Tieko KOBAYASHI, la vicdirektorino de Ŝtata Edukcentro por Virinoj. La ĉefprelego de Spomenka ŠTIMEC katenis ĉies atenton pro du kialoj – la personeco de la prelegantino kaj la kvalito de la prelego, ambaŭ bone reprezentis la konferencan ĉeftemon. La *simpozio* daŭris tutan tagon, do ni povis ĝui pliajn prelegojn:

- Anna LOWENSTEIN: Virina agado en la E-movado dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj;
- Setsuko YAMAKAWA: Historieto de Japana "Sekso kaj Egaleco" – Kion ni povis, kaj ne povis, fari?
- Toyohiko KABA: Kiu volas nomu min perfidulo! – Verda Majo kaj la japana socio;

– Vera BARANDOVSKA-FRANK: Virinoj kaj lingvokreado (la tekston tralegis Aida ČIŽIKAITĖ);
– Renato CORSETTI: La malbona lingvo: seksismo kaj aliaj ismoj en la okcidenta dialekto de Esperanto;
– Aloyzas GUDAVIČIUS Sekso kaj genro en Esperanto.



Spomenka ŠTIMEC kaj Marija JERKOVIČ (Kroatio) en Ranzan

Dum la *nacia vespero* s-ro HORI Yasuo konatigis nin kun japanaj kantoj kaj multegaj muzikinstrumentoj, popolaj ludiloj. Eĉ ĉiuj ricevis muzikinstrumenton, faritan de la prezentanto mem – ĝi nomiĝas cikado (reveninte hejmen mi rimarkis, ke tiu „muziko“ vere mankas, do mi jam utiligas la instrumenton en vesperoj kaj esperas, ke miaj najbaroj ne koleras). Fine da la tago Zsófia KÓRÓDY prezentis bildojn kaj rakontis pri seminaro en Benino, prezentis la lokon de la venonta ILEI-konferenco.

Du sekvaj tagoj estis plenplenaj de aktivaĵoj. Dum unuj kun Dennis KEEFE pretiĝis por *Lingva Festivalo*, aliaj partoprenis en prelegoj kaj seminarioj (paralele okazis komitatkunsido):
– Zsófia KÓRÓDY: Paŝoj al metodika perfektiĝo (3 partoj);
– Kimie MARKARIAN: Sorobano (2 partoj);
– Marie-France CONDE REY: *Femina*, la prisilentita revuo;
– Mihai TRIFOI: Esperanto kiel studobjekto en lernejoj;
– Dennis KEEFE: Kiel organizi lingvan festivalon por varbi novajn gelernantojn de E-o;

– Michael CWIK: Kiel atingi ne-diskriminacion en inter-etna, inter-kultura kaj internacia komunikado? – Teoria kaj praktika solvo por multlingvaj komunumoj kaj internaciaj organizaĵoj;
– Denis KEEFE: La tradicia Cseh-metodo kaj la BEKkurso – Sur la sama vojo?;
– Marija JERKOVIĆ: Kroataj verkistinoj en esperanta kaj japana kulturoj.

Krome Lucille HARMON prezentis la DVD-kurson „Pasporto al la tuta mondo" en kiu gravas virinaj roloj. Du programeroj, kiuj meritas apartan mencion: la *Lingva Festivalo* kun 20 lingvoj, bedaŭrinde, ĉi-foje ne estis publika, tamen ĝi kaptis la atenton de kelkaj personoj, kiuj partoprenis en aliaj aktivaĵoj de la Centro; kaj la kunveno, kie Spomenka ŠTIMEC renkontis legantojn. Vespere Zsófia KÓRÓDY prezentis la E-urbon Herzberg kaj invitis al antaŭkongresaj ekskursoj de UK 2008.

Ĉiam nin ĝojigis japanaj manĝaĵoj, kiujn tre zorge elektis nia ĉefa loka organizantino Tieko – ĉiam estis io alia, io nevidita kaj ne spertita. La *bankedo* estis vera festo, sed ne nur por stomako – pli por okuloj kaj animo. Fine de la bankedo ĉiuj kantis siajn naciajn kantojn, do ĝi estis kvazaŭ provludo por internacia artvespero. Post la bankedo Wim POSTHUMA instruis al ni usonajn dancojn.

La tuttaga ekskurso al Nikko, mondfama loko, proklamita heredaĵo de kulturo de UNESCO estis tre bela kaj agrabla pro sia natura ĉirkaŭaĵo. Laŭ la anticipa plano la dua parto de la konferenco devis esti nur konatiĝo kun la japana kulturo kaj ekskursa programo, tamen ni bezonis plian tempon por labori, do post duontagaj ekskursoj al Kawagoe, Ogawa kaj piede tra Ranzan ni havis ankaŭ prelegojn kaj seminariojn: Ana MONTESINOS: Lingvaj ludoj (3 partoj), Zsófia KÓRÓDY: Organizado, varbado, motivado por lernejaj projektoj; Dennis KEEFE: Pri novaj vojoj por internacia lingvotestado; Terezija KAPISTA: Esperanto – lingvo de paco (spertoj el Burundio kaj Irano); Zsófia KÓRÓDY: Planoj, postuloj, realigo de nova UEA/ILEI-ekzamenoj laŭ la Referenckadro. (Ankaŭ la dua parto de la komitatkunsido okazis paralele kun la prelegoj kaj seminarioj.)

Por pli bone konatiĝi kun la japana kulturo ni sekvis kelkajn specialajn kursojn: te-ceremonio, ikebano, furoŝiki, origamio. Al ni ŝajnas, ke ni ion lernis, sed se ne, almenaŭ ni iomete tuŝis kaj spertis specialaĵojn de la gastiganta lando. En la vesperaj programoj kantis Yas KAWAMURA, Julian HERNANDEZ ANGULO, gitarludis Jesuo DE LAS HERAS, Wim POSTHUMA prezentis filmojn: Someraj kursoj en la sveda E-domo, Revo de Koffi kaj Himalaja renkontiĝo en 2000. Ĉiuvespere ni havis iom da tempo por

agrabla amika kunesto, babilado kaj dancoj, pri kiuj zorgis Wim POSTHUMA, sed tiuj horoj kaj minutoj ĉiam estis ege mallongaj kaj tre rapide forflugis. Spertulo nelacigebla Robert MOERBEEK kolektis lingvajn erarojn dum la tuta konferenco kaj dum vesperoj en vestiblo priparolis ilin kun la lingvemuloj.

Pro manko de kandidatoj, ILEI/UEA-ekzamenoj ne okazis. La konferencan laboron filmis kaj fotis Michael CWIK. Espereble ni vidos tiun foto- kaj videoarkivon. La lastan tagon okazis ĝenerala *asembleo* dum kiu partoprenantoj kun estraranoj priparolis la konferencon kaj interŝanĝis opiniojn pri la laboro kaj kunlaboro komuna kaj en apartaj sekcioj, liveris proponojn por la sekvaj konferencoj. La ferman ceremonion gvidis Zsófia KÓRÓDY. La estrarano pri konferencoj dankis la kunlaboron al ĉiuj helpantoj, kaj invitis la ĉeestantojn partopreni la sekvajn konferencojn en Portonovo (2008) kaj Maribor (2009). Vespere ĉiuj dezirantoj prezentis sian hejmlandon dum la internacia artvespero kaj sekvis longaj adiaŭoj. La tutan surlokan organizan laboron sur siaj ŝultroj prenis la sekciestro de japana ILEI-sekcio Tieko ISIKAWA. Nur danke al ŝi ni havis la eblecon konferenci en Ranzan kaj ĝui ne nur la laboran, sed ankaŭ la kulturan kaj ekskursan partojn de la konferenco. Koran dankon al Tieko pro ŝia kunlaboremo, helpemo kaj pacienco. *Kompilis: Aida ČIŽIKAITĖ (Litovio)*

Persona opinio de ĉefa loka organizanto

Mi tre ĝojas ke la konferenco en Ranzan finiĝis sen granda kaoso. Kvankam estis kelkaj neatenditaj „akcidentetoj", kiuj okazis pro manko de spertoj miaflankaj organizi internacian aranĝon, ĉiuj tute verŝajne ĝuis nian konferencon kum iom da nekutimaj aspektoj. La lokaj ĵurnalistoj bedaŭrinde ne montris intereson pri nia afero, malgraŭ mia informo al ili, tamen certan atenton ni tiris de kelkaj kiuj ĉeestis pro aliaj okazaĵoj en Ŝtata Edukcentro por Virinoj. Gejunuloj angle alparolis al ni, sed post kelkaj minutoj eksciinte ke ni parolis E-e, ĉiuj miris kaj demandis kio estas E-o. Ili propraokule vidis ke E-o estas vivanta lingvo kaj uzebla. Feliĉe ke ili renkontis nian lingvon en tia bona situacio. Ne perfektan sed sufiĉe agrablan konferencon mi povis aranĝi danke al multaj personoj, precipe al s-ro Yasuo HORI, s-ro Syuiti YAMAKAWA kaj s-ino Setsuko YAMAKAWA, kiuj helpis min diversmaniere dum la konferenco. Kelkaj japanaj geamikoj helpis dum ekskursoj kaj kursoj pri japana tradicia kulturo. Koran dankon al ĉiuj! *S-ino Tieko ISIKAWA (Japanio)*

Jen propono por postkongresa E-umado en Afriko!

La 41-a Konferenco de ILEI

29 julio – 5 aŭgusto 2008, Portonovo, Benino

"Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero"

Esperantistoj de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj kontinentoj! – Vi estas invitataj partopreni la ILEI-Konferencon por omaĝi kaj kuraĝigi la lokajn samideanojn, doni instigon al pliaj paŝoj kaj helpi disvastigi nian lingvon en la tuta mondo. La ILEI-konferenco en Afriko en la jaro 2008 estos grava evento kaj por la E-movado entute kaj por la historio de ILEI same kiel por la E-movado en Afriko.

Konferencejo kaj tranoktejo: ŜONGAI CENTRO, BP 597, Tel.: 229 20225092, Fakso: 229 20222050, Porto-Novo, Benino. Ĝi troviĝas en bone prizorgata granda park-aspekta tereno de agrikultura edukcentro proksime al la urbocentro. Por tranokti en la sama centro ekzistas jenaj ebloj (por la tuta konferenca periodo, krom la postkonferenca ekskurso – por unu persono – ĉiuj manĝoj inkluzivitaj):

– en 1-lita ĉambro (klimatizilo, duŝejo, necesejo) ..... *282 EUR*
– en 1-lita ĉambro (ventumilo, duŝejo, necesejo) ..... *234 EUR*
– en 2-lita ĉambro (klimatizilo) duŝejo, necesejo koridore ..... *210 EUR*
– en 2-lita ĉambro duŝejo, necesejo estas en koridoro ..... *171 EUR*
– en 3-lita ĉambro duŝejo, necesejo estas en koridoro ..... *153 EUR*
– en 4-lita ĉambro duŝejo, necesejo estas en koridoro ..... *139 EUR*

Manĝoj: Ĉiuj manĝoj estas inkluzivitaj, mankos eblo por mem zorgi pri manĝado.

Konferenca programo: Konsiderante, ke tiu ĉi internacia aranĝo estos grava evento por afrikanoj la konferenca programo devos esti vere bunta kaj abunda. Por la konferenca programo oni antaŭvidas tradiciajn programerojn: inaŭguron, komitatkunsidojn, estarkunsidojn, ekzamenojn de ILEI/UEA en elementa kaj meza niveloj, interkonan, artan kaj nacian vesperojn, solenan fermon. Bonvenas ĉiuj pliaj proponoj kaj sinproponoj. Bonvolu skribi al: <*aidute@mail.lt*>. Laŭeble okazos ankaŭ programeroj, kiuj jam iĝas tradiciaj: unutaga *Scienca Simpozio* laŭ konferenca temo – konatigo de lokaj aŭtoritatoj kaj intelektuloj kun la E-medio kaj ebligo de daŭra kunlaboro de e-istoj kaj neesp-istoj; *Lingva Festivalo* (prezento de lingvoj kaj kulturoj fare de partoprenantoj de la konferenco el diversaj landoj) – laŭeble publika, kiel donaco de e-istoj por lokaj loĝantoj kaj unu el la formoj de kunlaboro kaj konatiĝo kun la loka medio, ankaŭ kiel efika varbilo por nia lingvo; bankedo – komuna adiaŭa vespermanĝo en lukseca etoso; vesperaj renkontiĝoj kun kultura programo en agrabla etoso. Informoj pri eventualaj seminarioj aŭ programeroj kaj iliaj kondiĉoj aperos en venontaj IPR kaj ttt-ejo de ILEI. Pli preciza programo estos dissendita al aliĝintoj en *Dua Informilo* fine de marto.

Ekskursoj: DT1: Adjarra (metiista vilaĝo) – *12,00 EUR*. **DT2**: Aguegus (per boato laŭ rivero So kaj lago Oueme) – *12,00 EUR*. **DT3**: Dangbo (kuracejo, varma fonto) – *12,00 EUR*. **DT4**: Bimyns (turisma centro kun ludejoj kaj sovaĝbestoj) – *15,00 EUR*. **TT**: tra Portonovo (vizito de la konferencurbo) – *20 EUR*. **PE**: Kétu, Kové, Abomey, Azove, Aplahoué, Lokossa, Bopa ĉe lago Aheme (festo Zangbeto), Ouidah, Vidjrosse, Abomey-Calavi, Ganvie kaj Portonovo aŭ Cotonou – *290 EUR* (en 1-lita ĉambro) kaj *240 EUR* (en 2-lita ĉambro).

Alveno post UK: Estas esplorataj variantoj pri komuna vojaĝo. Informoj aperos en la retejo de ILEI (http://ilei.info/konferenco/) kaj en IPR 4/07.

Bankedo: festena komuna vespermanĝo en loka restoracio kun afrika vino kaj lokaj manĝaĵoj (**A**-landoj *35 EUR*, **B**-landoj *20 EUR*, **C**-landoj *1 EUR*).

La kotizoj: ili varias depende de la loĝlando de la aliĝanto:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B kaj C.

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.) kaj Latinameriko.

C: ĉiuj landoj de Afriko

Kotizoj (en EUR)	ĝis 31.03.08	ĝis 30.06.08	ekde 01.07.08
Aliĝkategorio	**A / B / C**	**A / B / C**	**A / B / C**
1. Membro de ILEI	*50 / 30 / 5*	*60 / 36 / 5*	*70 / 42 / 10*
2. Ne ILEI-ano	*55 / 35 / 5*	*68 / 44 / 5*	*80 / 52 / 10*
3. Junulo, handikapulo	*25 / 15 / 5*	*30 / 18 / 5*	*35 / 21 / 10*

Aliĝkotizo por 1 tago: *25 EUR* por **A** kaj **B** landoj, *5 EUR* por **C** landoj.

La kotizo ne inkluzivas restadon, ekskursojn, aparte pagendajn aferojn, ajnan asekuron. Konferencaneco estas transdonebla, sed necesas alpagi diferencon depende de lando kaj aliĝperiodo. ILEI diferencon ne repagas.

Por mendoj atingantaj nin **post la 1-a de majo 2008** oni devas aldone pagi 10% de sumo por mendataj servoj. **Post la 1-a de junio** ni ne povos mendi al Vi tranoktadon. PLIE LEGEBLOS: en la retejo de ILE kaj en IPR 4/07. Se Vi havas demandojn, bonvolu skribi al: aidute@mail.lt.

Pagebloj:

[ ] al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante: "ILEI-Konferenco", nur se vi pagas ĝis la 15-a de majo 2008;

[ ] al la bankokonto de ILEI en Svedio: IBAN: SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6,00 EUR por svedaj bankokostoj se vi pagas de ekster Eŭropa Unio. El Svedio eblas pagi al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Förenings-sparbanken.

La aliĝo validas nur post kiam la Kasisto ricevis vian pagon. Kiel aliĝdato validas la dato en kiu via pago atingis la konton de ILEI.

La prezoj por restado estas iom rondigitaj por plifaciligi la partoprenon de niaj afrikaj samideanoj.

La 42-a ILEI-konferenco, Maribor, Slovenio 2009

Kiel Vi scias, estas lanĉita konkurso por okazigi ILEI-Konferencon en la jaro 2009. Al la alvoko respondis 5 ILEI-sekcioj aŭ aliaj organizontoj. Interesiĝis Rumanio, Finnlando kaj Hispanio. Armenio sendis eĉ du tre interesajn proponojn. La plej ampleksa kaj alloga propono venis de Slovenio. Ankaŭ pro la faktoj, ke en 2007 kaj 2008 la konferencoj okazas ne en Eŭropo, 2009 estas elektojaro kaj UK okazos en Bjalistoko (Pollando), oni decidis okazigi la 42-an ILEI-Konferencon en Maribor.

Maribor laŭ grandeco estas la dua urbo en Slovenio. Ĝi estas ekonomia, universitata, kultura, sporta kaj foira centro de nordorienta parto de la ŝtato. En la urbo jam okazis kelkaj gravaj E-eventoj kaj la urbo estas konata por multaj e-istoj. Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne vizitis ĝin, ni proponas virtualan ekskurson en *www.burger.si*.

Pliaj informoj kaj pli detalaj priskriboj de la konferenco, ĝia urbo kaj programo aperos en la sekvaj numeroj de IPR kaj en la retejo de ILEI (*www.ilei.info*).
Se Vi havas demandojn, proponojn, komentojn aŭ specialajn dezirojn, Vi ĉiam estas bonvena skribi al la estrarano pri konferencoj *Aida ČIŽIKAITĖ <aidute@mail.lt>*.

Anoncoj…

Por **okazigi ILEI-konferencon en 2010** denove estos lanĉita konkurso – sekvu la novaĵojn en niaj revuo kaj retejo kaj aktive partoprenu en la konkurso – invitu la konferencon al Via lando, urbo, klubo!

Karaj gekolegoj,
la redaktoro de *JUNA AMIKO* petas vin legi la sekvajn artikolojn de la septembra n-ro: „Rubaĵeton ĉiu-tage!" (p.13), „Venu por interkonatiĝi reciproke!" (p.6-7.), „Kvizoludo" (p.12) kaj aktivigi viajn lernantojn, la celgrupanojn. Helpu al ili, mi petas, se ili bezonas vian apogon.

Anticipe tutkore dankas: Géza KURUCZ

LABORKOMISIONOJ
Ekzamena: Probal Dasgupta (prez.), Boris Grigorjevič Kolker (vicprez.), Reza Torabi (sekr.), Mireille Grosjean, Julián Hernández, Jorge Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze
Elekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman
Lerneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
Regulara: Marija Beloŝevič, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ
EEU: Eŭropa Esperanto-Unio. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: Carola Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi
E@I (Esperanto ĉe Interreto, www.ikso.net): faka sekcio de TEJO (www.tejo.org, poŝtadreso ĉe UEA).
FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj): Reprezentanto de ILEI: Jennifer Bishop, esperanto@Education.monash.edu.au
IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: François Hounsounou (adr. sur p. 40., Benino).
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: Radojica Petrović. A-komitatano el ILEI: Atilio Orellana Rojas. Observanto de UEA ĉe ILEI: Claude Nourmont. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: François Hounsounou
UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: François Lo Jacomo, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; Monique Arnaud, Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr; Jean-Pierre Boulet, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60; Mireille Grosjean, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, mireille.grosjean@rpn.ch
MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: Sjoerd Bosga, Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se.
La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.
* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).
* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
Hejmpaĝo de ILEI: http://www.ilei.info

REDAKCIAJ INFORMOJ
Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem. Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.
Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: <jozefonemeth@yahoo.com>, http://www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, <r.moerbeek@wanadoo.nl>.
La numeron ni sendis al la presejo 4 septembro 2007, redaktofino

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana,
selimibardhyl@yahoo.com

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW, penivos@yahoo.com

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem,
iwona.kocieba@telenet.be

Benino: François Hounsounou,
BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika, hounfranc@yahoo.fr

Brazilo: Antonio Felix da Silva
Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243, Sumarezinho - São Paulo – SP, BR-05030-010, geinstruistoj@ileibr.org

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk,
angela@esperantoeducation.co.uk

Ĉeĥio: Jana Melichárková,
CZ-696 02 Ratíškovice 938,
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: Zhang Danchen, General For¬eign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan, zdchen@public.wh.hb.cn

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, arnecasper@dbmail.dk

Finnlando: Carola Antskog,
Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, cantskog@kolumbus.fi

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la crémaillère,
FR-59650 Ville¬neuve d'Ascq, michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia Kóródy,
Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, zsofia.korody@esperanto.de

Hungario: József Németh,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, jozefo.nemeth@gmail.com

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, hamzeh@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8,
IT-43100 Parma, silkovojo@aliceposta.it

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, isksanjo@ff.e-mansion.com
Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2,
ES-17300 Blanes, ileicat@hotmail.com
Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, shcho@inha.ac.kr
Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, mjerkovic@net.hr
Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, ilei@hes-keu.hr
Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, kubesp@enet.cu
Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, iei001@tiscali.nl
Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17,
NO-7033 Trondheim,
anne.k.bondhus@itk.ntnu.no
Pollando: Piotr Nosek, ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042 Kraków, piotr.esp@gmail.com
Rumanio: Mihai Trifoi,
Str. Principala Bl.1 Ap.3,
RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, trifoi@honoris.ro
Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, mirina@online.ru
Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, s.burell@telia.com
Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9,
CH-2416 Les Brenets mireille.grosjean@rpn.ch
Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, esp.togo@cafe.tg
Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, nina_daniljuk@ukr.net
Usono kaj Kanado: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), dorothyh77@gmail.com
Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, andesp@internet.ve

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldo-vakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, LIDELB@freenet.am

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, esperovr@yahoo.co.in

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, hecg@uea.org

Estonio: Helgi Hromova,
Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13,
IS-221 Hafnarfjörður, loftur@skyrr.is

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, saviogp@zahav.net.il

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, tikoguau@gmail.com

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, piliponis@centras.lt

Meksiko: José de Jesús Corrales C.,
Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. jdjcorrales@yahoo.com.mx

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, gwenda.s@ihug.co.nz

Portugalio: João José Santos, Fonte Velha, Cx. 3003 PT-7100-078 Estremoz, joaojosesantos@gmail.com

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Ĉaĉak, radp@ptt.yu

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana, Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt,
UZ-700000 Taŝkento, CIS, esperuzo@mail.ru

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW, *penivos@yahoo.com*

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *iwona.kocieba@telenet.be*

Benino: François Hounsounou, BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika, *hounfranc@yahoo.fr*

Brazilo: Antonio Felix da Silva Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243, Sumarezinho - São Paulo – SP, BR-05030-010, *geinstruistoj@ileibr.org*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan, *zdchen@public.wh.hb.cn*

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, *michel_dechy@hotmail.com*

Germanio: Zsófia Kóródy, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *hamzeh@esperanto.org*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *ileicat@hotmail.com*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iei001@tiscali.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17, NO-7033 Trondheim, *anne.k.bondhus@itk.ntnu.no*

Pollando: Piotr Nosek, ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042 Kraków, *piotr.esp@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, *s.burell@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets *mireille.grosjean@rpn.ch*

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj **Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh77@gmail.com*

Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, *andesp@internet.ve*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Portugalio: João José Santos, Fonte Velha, Cx. 3003 PT-7100-078 Estremoz, *joaojosesantos@gmail.com*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Čačak, *radp@ptt.yu*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Počtamt, UZ-700000 Taškento, CIS, *esperuzo@mail.ru*